

NOVAĴLETERO

Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista - Reĝa Societo
Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep, Kon. Maatschappij

Nr. 10 - Aug. 1984

Verantw. Uitgever:

Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97
B-8000 Brugge

Tel. 050/33.00.04

Het bestuur van de Brugse Esperanto-Groep is bijeengekomen op 13.8.84 en heeft beslist te onderhandelen met de Esperantogroep "Paco kaj Justeco" met het oog op mogelijke nauwere samenwerking tussen beide Esperanto-groepen van de stad.

Het zou ons genoegen doen suggesties terzake te ontvangen van onze leden.

Kio estas Markola Kongreso ?

La Markola Kongreso ekfondiĝis el ideo de Norman Smith de Dover (tiam memnomata "Dovra Soleo") en la jaro 1961. Norman konsciis la bezonon por malgranda jara kuniĝo inter Esperantistoj de ambaŭ flankoj de la Markolo, por akceli la laboron por Esperanto en la regiono de la markolaj havenoj, kaj kiel okazo por tiuj lokaj Esperantistoj fari ligilon trans la Markolo mem. La origina celo estis, ke la kongreso kunvenus prefereble en sufiĉe granda loĝloko, kie la Esperantistoj povus kunresti, uzante la internacian lingvon kiel la sola lingvo dum la tuta periodo de la kongreso. Neesperantistoj kaj la komunikiloj estus invitataj al publikaj kunvenoj kaj funkcioj, kie ili povus vidi Esperanton, laborantan kiel vere internacia kaj vivanta lingvo.

La unua Markola Kongreso okazis en Boulogne en la jaro 1962, post pluraj transmarkolaj ekskursoj de Norman Smith kaj du membroj de la Folkestone'a klubo por renkonti aliajn interesulojn en Boulogne, Calais kaj Oostende. La unua estis sukcesega kongreso kun pli ol 100 ĉeestantoj. La dua en Dover, la sekvantan jaron, estis aranĝita de Norman Smith mem, kiu per publikaj konkurso kaj kunveno, penis allogi la atenton de estontaj Esperantistoj kun iom da sukceso. Sekvis aliaj kongresoj tra la jaroj malgraŭ malfacilaĵoj pro kost-altiĝoj, manko de taŭgaj konferenclokoj kaj de volontuloj.

La kongresoj jam okazis en Folkestone, Ramsgate kaj St. Mary's Bay en Anglujo, Calais kaj Boulogne en Francujo, Oostende, Brugge, Kortrijk kaj Antwerpen en Belgujo. Ĉiam la kongresoj ricevis reklamon per oficialaj akceptoj de la urbestroj, raportoj kaj fotoj en lokaj kaj naciaj ĵurnaloj, publikaj konkursoj, kunvenoj kaj ekspozicioj, kaj televidaj intervjuoj.

Kelkaj el la elstaraj momentoj de la pasintaj kongresoj, kiujn oni ĉiam rememoros, estas la 4-hora bankedo en Boulogne; la blov-orkestro, kondukanta la ĉeestantaron de la Dovera Kongreso en 1963 al la haveno, ludante "La Esperon", frue dimanĉmatene; ekskurseto sur unu el la unuaj ŝvebŝipoj ĉe Calais; rigardo al la mirinda "Procesio de la Sankta Sango" en Brugge; dormado sur duetaĝaj litoj en St. Mary's Bay; la inkluziva kosto de la semajnfina restado (de vendreda vespero ĝis dimanĉa posttagmezo) ĉe gastejo en Folkestone (1970) po £4 17s 6d (FF 58,50) por plena tarifo !

Sendube la ĉefa profito de la kongresoj estas la kontaktoj inter Esperantistoj ambaŭflanke de la Markolo, renovata ĉiujare, kun la rezulto de multaj daŭraj amikecoj.

Gordon Hawker

(el "Ora Sago" de South-Eastern Esperanto Federation, 5-1984)

Pri la venontjara Markola Kongreso

Fine de julio jam estis 26 aliĝoj: 13 britaj, 12 belgaj kaj nur unu franca. La aliĝintoj ricevos konfirmilon fine de septembro.

Vojaĝi al Pekino

En 1986 la 71a U.K. de Esperanto okazos en Pekino (Ĉinio). Tiucele, Esperanto-Centro - PF 1450, D-4790 Paderborn - organizos du vojaĝ-grupojn el Frankfurto. Ili kostos proksimume 3.000 gmk (Vojaĝo B, daŭro unu semajnon) kaj 5.000 gmk (Vojaĝo A, daŭro 3 semajnojn). Dum la unua trimestro, jam 16 personoj aliĝis kaj pagis 200 gmk.

SC

(el Heroldo de Esperanto, 9(1732), julio 1984)

La virŝafo de Derby...

... estis la simbolo de la 40a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, okazinta en Swanwick, Britio, inter la 13a kaj 20a de julio. Jam la tria IJK kiun mi partoprenis, do eblus kompari^{se} ĉiuj IJK-oj ĉiuj havas ion nedifineblan, kio faras ilin tute unikaj. Tial mi donos nur supraĵan kaj certe ne kompletan superrigardon de la kongres-semajno junulara.

Unua ĝojiganta konstato: la britoj trovis ege taŭgan kongresejon: aro da ĉarmaj konstruaĵoj, ĉambroj unu- kaj dulitaj, trinkejo, diversgrandaj salonoj, kapelo, ĉio ĉi ĉirkaŭata de herbejoj kaj verdaĵoj. Bedaŭrinde la vetero ne ebligis la uzadon de la subĉiela banejo. Kompense estis instruataj la tipe britaj ludoj kroketo kaj kriketo, kaj la al kontinentanoj pli konata flugpilko. En la programo ĉiu povis trovi ion laŭ sia plaĉo: estis tuttaga ekskurso al apudaj kavernoj kaj bestoĝardeneto, okazis prelegoj pri humuro, armilumado, la kimra lingvo, la Esperantokulturo, la venonta IJK en FRG, ... Abundis laborgrupoj pri la jam menciitaj sportoj, pri komputiloj, homo kaj fervojo, mediprotektado kaj (ne forgesenda) pri popoldancado brita kaj mediteranea; estis kursoj por komencantoj, ekumena diservo, k.t.p. Vesperojn oni dediĉis al interkonatiĝo, ekkonatiĝo de la brita kulturo, al teatro kaj filmo (LKK sukcesis montri la ĝis nun ununuran Esperantofilmon "Angoroj", kiu jam dum kelkaj jaroj perdiĝis), kaj al kostumbalo dum kiu sufiĉe granda parto de la kongresanaro pruvis ke littukoj facile povas esti uzataj kiel alivestaĵoj romiaj, arabaj aŭ hindaj. Kaj kiel kutime, komuna kantado kaj babilado, ĉefe dum kaf- kaj teapauzoj, pasigis multe da tempo.

Resume: estis bonege organizata kongreso, sen grumblaĵoj, sed bedaŭrinde ankaŭ sen veraj kulminoj, kiel estis la entendegaj vesperoj en Leuven aŭ la baneja nokto en Debrecen. Adiaŭante, kongresintoj tamen havis nur unu deziron: ĝis la revido en Eringerfeld !

AR

Weer Esperantisten op bezoek in China

Onder leiding van de Britse Esperantiste Nancie Durham bezocht een Esperanto-gezelschap met deelnemers uit Groot-Brittannië, Frankrijk, Nederland, West-Duitsland, Italië, Zwitserland en Denemarken van 19 april tot 10 mei China. Tijdens een reis van 4.000 km door China bezochten zij bezienswaardigheden in Peking, Nanking, Shanghai en andere plaatsen. Zij maakten er kennis met het leven van het Chinese volk en ontmoetten zo'n 500 Chinese Esperantisten.

De Grote Muur is één der wereldwonderen die een toerist zeker moet gaan bekijken. Dit werd de eerste halte op de reis. De Grote Muur is gebouwd in een heuvelachtig gebied en een beklimming van de steile gedeelten is soms lastig, maar allen hielden vol. Sommigen haalden af en toe hun fototoestel boven om het indrukwekkende bouwwerk te fotograferen. Op de terugweg naar het hotel was iedereen vol bewondering. Ik vroeg wie het hoogste deel van de muur bereikt had, en de meesten staken de hand op. Ik citeerde een vers van Mao: "Wie de Grote Muur niet bereikt, is geen held". Zij antwoordden: "Wij zijn allemaal helden !" Mevrouw Sija, personeelslid van UEA, was opgetogen: zij bereikte als eerste de top.

Als u fijn Chinees porselein koopt voor uw familie, een luxueuze halsketting uit jade als verjaardagsgeschenk geeft, een feest bijwoont in een geborduurd Chinees kleed, of een waaier uit sandelhout laat bewonderen door uw vriendinnen, weet u dan hoe die gemaakt werden ? De deelnemers aan de reis konden de werkplaatsen bezoeken waar deze zaken zorgvuldig met de hand vervaardigd worden. In Hangzhou plukten ze theebladeren, zagen ze de bereiding van de beroemde groene thee van Longzhen en proefden ze versbereide thee.

Zij bezochten ook een lagere school, een jeugdcentrum en arbeiders- en boerengezinnen op verschillende plaatsen. Aldus maakten zij kennis met het onderwijssysteem en het alledaagse leven in China. Op een dag, na een regenbui, bezocht de groep een veld op het ogenblik dat de bewoners bezig waren met het verspenen van de rijstplanten. Velen waren bijzonder verheugd omdat ze voor het eerst het mooie Zuidchinese lentelandschap konden bewonderen.

Tijdens een bezoek aan een familie die gedurende de voorbije jaren welstellend geworden was, had de Zwitserse ingenieur Armand veel belangstelling voor de methaangastank en het fornuis. Hij verklaarde zich bereid om op dit gebied hulp te verlenen, als dit nodig mocht zijn.

Bijna alle Esperanto-toeristen kregen een onthaal waar anders-taligen niet konden van genieten. Overal waar ze kwamen werden ze hartelijk ontvangen en begeleid door Chinese Esperantisten. Niemand had verwacht dat midden in de nacht, in een koud, nat en winderig station, een groep van meer dan dertig Chinese Esperantisten hen zou opwachten met groene vlaggen ! Overal waren plaatselijke Esperantisten, zowel veteranen als beginners, bereid om de gasten rond te leiden. Soms ging het om jarenlange pennevrienden, meestal om onbekenden.

Gong Pejkang

(Vrij vertaald uit "El Popola Cinio", 8-1984)